

Feliĉajni somerferiojn 2005!



Julio – 2005 – N-ro 34-a
ASTURIO


ENLAVO

- 2...Nia Regiono
- 3...Ortega kaj Gasset
- 4...Por Kati
- 5...Soleco
- 6...Mozaiko
- 7-8Bonsaĵoj
- 9...Mesaĝoj
- 10..Rakonto el Brazilo
- 11..La filo de la Lavistino
- 12..Divino
- 13..La saĝa mulo
- 14..Tra Rotterdamo
- 15..Amuzaĵoj
- 16..Dum maturiĝo



**REVUO DE LA AVILESA
ESPERANTO - GRUPO**

Bonvole: ne forgesi min!



EILAO

Estraro de ANTAŬEN

Honora Prezidanto: Nicolás Muñiz

Prezidanto: Cezaro García

Sekretariino: M^a Luísa Menendez

Direktado kaj Desegno

revuo Antaŭen: Císimo Rabanedo

Kasisto: Luis González

Bibliotekistino: M^a Isabel Murillo

Gekomitatanoj:

M^a José Álvarez Faedo

Valentín Pérez

Eva González

Celestino Majo

Tere Rodríguez

Daise Murillo

Nia adreso

Llaranes Poŝtokesto 51 (CP 33460)

AVILEŚ Asturias

Tfn 98 554 11 27

esperanto@asturies.org

Depósito legal:

Nº AS 1398 (1991)

N.I.F. 33677378

Subvenciita de la Registaro
de la Avilesa Municipo

NIA REGIONO

EILAO

La municipo Eilao (en hispana lingvo Illano, en asturgalica lingvo Eilao) apartenas al tiu grupo de okcidentaj asturaj regionoj en kiu oni parolas la lingvan variaĵon "asturgalica", miksaĵo da astura kaj galica. Ĝi havas molan topografion, kaj ĝin trairas la rivero Navia, en kiu troviĝas la akvretenejo Doiras. La ĉefvilaĝo estas Eilao. En la loko La Bobia, apude al la sanktejo Pastur, estas fama jarmilaĝa arbo: la taksuso de Pastur, kun 17 m. da alteco kaj krono-diametro da 20 m. Ĝi estis deklarita Natura Monumento en 2003 de la Astura Registaro. Estas ankaŭ menciinda la Pordistra Areo "Alto del Folgueirou" (altejo), apude al la montaro San (Sankta) Isidro, kun belegaj vidaĵoj al arbaroj da aŭtoktonaj specioj. Aliaj vizitotaj lokoj estas la "Fonte da Pedra" (Ŝtona Fonto) en Pastur, la "Mirador (rigardejo) de Penamayor" en la vilaĝo San Esteban kaj, ekde pluraj taŭgaj anguloj, la rivero Navia mem, kiu naskiĝas en Pedrafita do Cebreiro (en provinco Lugo, Galicio) kaj finiĝas en la estuaro de sia sama nomo, en la Kantabrika Maro.

Parolante pri historio, oni devas diri ke estas antikvaj ŝpuroj de la ĉeestado de homoj en Eilao, kiel tiuj apartenantaj al la kastroj (praaj konstruaĵoj) de Castelloes, en la loko Sarzol, paroko Herías, kaj en El Castelón, paroko Eilao. Iuj famaj festo-tagoj: festo de Bullaso (dua dimanĉo de oktobro), festo El Carmen, en la vilaĝo El Pato (sekva dimanĉo al la 16 de julio) kaj festo "das Neves" (de la neĝo) en Cernías (5 de aŭgusto).

La Redakcio

ORTEGA KAJ GASSET

Josefo Ortega kaj Gasset, unu el la plej gravaj hispanaj pensistoj de la xx-a jarcento, naskiĝis en Madrido la 9-an de majo de 1883 kaj forpasis en la sama ĉefurbo la 18-an de oktobro de 1955. Lia patro estis la ĵurnalisto kaj verkisto Josefo Ortega Munilla.

Ortega kaj grekan kaj doktoriĝis en beletro en la Li pasigis plurajn studanta en la Lepsiko, Berlino

Post la morto nia biografiigato plenumo sian taŭgecon la katedron universitato kie li doktoriĝis.

Inter liaj unuaj verkoj elstaras "Meditaĵoj de la Kihoto" okaze de la majstroverko de Miĥaelo de Cervantes de kies eldonado oni festas en tiu ĉi jaro la kvaran jarcenton. Dum sia juneco Ortega publicis en diversaj revuoj, kaj poste en la ĵurnaloj "El Imparcial" kaj "El Sol" ĉiam praktikanta la kritikon kiel patriotismo. En de 1923, kun Ferdinando Vela, li fondis la "Okcidenta Revuo", kie enhaviĝas ĉiuj la literaturaj, artistaj, historiaj kaj filozofiaj malkvietoĵoj. Frazo de Ortega por la posteco estas: "Mi estas mi kaj mia cirkonstanco" Li verkis ankaŭ "Nevertebra Hispanio", la ok volumojn de la "La spektatoro", "La temo de nia tempo" kaj "La ribelado de la homamasoj".



Gasset lernis la latinan lingvojn, kaj li 1904 en filologio kaj Centra Universitato. jarojn en Germanio, universitatoj de kaj Marburgo. de Nikolao Salmeron, gajnis pruvinte de metafiziko en la

CELESTINO

POR KATI

Mi dezirus lerti skribi por esprimi en diversaj linioj ĉion kion vi signifas por ni. Kiam vi eniris nian hejmon vi estis blanka kaj nigra harar-bulo; apenaŭ vi aĝis tri monatojn kaj jam vi emociis nin. Nia filo, vin vidinte, ne povis kredi ke vi estas donaco por li, sia nova kunludantino kaj iu prizorgota. Tia estis lia emocio,



eksciinte ke li rehavos novan amikinson, ke li ekploris... kaj vidante lin tiel ni, lia gepatroj, kaj kelkaj geamikoj kiuj ankaŭ estis tie ankaŭ ne povis eviti ke larmoj fluu de niaj okuloj. Ni estas vivintaj kune jam por 13 jaroj, kaj kvankam iam ni ĉagreniĝas pro vi, estis multege pli da

gajeco ol da afliteco tio kion vi donis al ni. Hodiaŭ, tute blinda, vi daŭre donas al ni vian karesemon kaj vi esperas nenion interŝanĝe. Mia plej granda deziro estas tio, ke ni povu doni al vi, nun kiam vi ĝin pli bezonas, ĝian zorgadon kaj protektadon kiujn vi meritas. Mi dankas vin pro esti alveninta al ni kaj mi promesas al vi ke ni ĉiam estos viaflanke. Vi estas unika!

Ludoviko

SOLECO

Soleco:

Diktatorino de la nokto
Kiu ne vivanta, vivas
Kaj regas la tutan mondon
Per via ununura povo.

Soleco

Kiu en ĝustaj momentoj
Sternasflugilojn al vento
Inter ili detruante
Nian grandan feliĉecon.

Soleco:

Ja horoj en via sino
Malfineblas; nostalgio
Tiel malmola fariĝas
Ke, oni spirante, doloras

Soleco:

Kiu indiferenta ravas
Nian sendefendan eston
Kaj sciante ke ni ne atingas
eĉ sonĝi bonstaton.

Soleco:

Volvi vin neniukuraĝas
En vualoj de lojalec`
Ĉar ŝprucas de vi nur sugest`
“ekiru, ekiru, solec`”!



Verkis kaj esperantigis: *M^a Luisa Menéndez*

FLUGANTAJ AĴAĈOJ

Marshal Ferdinand Foch , franca militisto kaj estonta majoro en la unua tutmonda milito, aŭguris en 1911 ke "la aviadiloj estas interezaj ludiloj sen valoro por militistoj".



EĈ MAĈGUMO NE TIOM ŜVELAS

Oro estas tiel duktele ke el 30 gramoj de tiu-ĉi metalo oni povus fabriki draton je 85198 kilometroj

PEKLE



La tero posedas pli ol sep milionoj da kubaj kilometroj da marsalo, laŭ la fakuloj.

VE, PI ;

En 1873 matematikisto William Shanks kalkulis la valoron de la nombro pi (π) la decimalo 707. Li malfruis 15 jarojn.

SENMoviĜO SURORBITE

Ĉirkaŭ la tero orbitas proksimume 8000 satelitoj laŭ la NASA.



STRABA TORTOFRAPE

Ben Turpin, aktoro nomata "la straba Romeo" kaj kiu atingis kinarton je la mano de Charles Chaplin, estis la inventisto de la tortomilito, pli ofta skeĉo de la ekrano.

DAISE MURILLO

BONSAJOJ

Lastatempe mi vizitis ekspozicion de bonsajoj. Por la miro de la ĉeestantaro etendiĝis antaŭ ni arbaro da mirandaĵo: malgrandaj kverkoj, ne malpli malgrandaj kaj tordaj verd-kverkoj, arogantaj pinarboj je 20 cm., salikoj... eĉ eta pomarbo montris orgojle siajn branĉoj plenplenaj je fruktoj kun la grandeco de butono.

Proksime de tioma miraklo eksperta ĝardenisto klarigis ĉiujn la strebojn necesaj por atingi unu el tiuj nanetoj, “por atingi ekzempleron de ĉi tiuj karakterizoj oni bezonas longa proceso da jaroj -li diris- “ĝi estas preskaŭ kiel zorgi pri infano”.

Instinkte, aŭdinte tiun komparon, mi pensis pri geinfanoj. Niaj geinfanoj, tiuj kiuj kreskas en niaj urboj. Tiu viro ja pravis; samkiel al tiuj arbetoj kiuj ekde molaj ŝosoj estas celo de troa dorlotado kaj zorgado, al geinfanoj oni ĉion donas, eĉ multe pli ol tion kion ili bezonas: bonkvalita vestaĵo kiun, kreske, ili lasas nova, malĉipaj ludiloj kiuj post kelkaj tagoj suferas ekzilon je angulo -ĉar ili plu ne modas, granda amaso da dolĉaĵoj, tiomaj ke ilia organismo ilin ne povas asimili... Kaj ankaŭ samkiel, ekzemple, tiu arrogante pomarbo pri kiu mi antaŭe parolis (trudita al daŭraj pritondado sur branĉoj kaj radiko,

al troe porciuma akvumado kiu apenaŭ postvivas en flor-poto ne pli granda ol desertpledo) niaj gefiloj kreskas apenaŭ sen akompano de adolto, ligitaj por nia komforto al tiu virtuala kunulo kiu estas la televidilo, aŭ interreto, aŭ la perforta videoludo.

Pasante de mano al mano, de la vartistino al la avino, de ĉi tiu al la onklino, aŭ de klasĉambro al klasĉambro (karato, muziko, angla, pentrarto...) estante amataj sed ĝenante ĉie, kiel tiu ekzotika planto al kiu ni fine ne trovas angulon en la salono.

Ja geinfanoj ne akordas en niaj vivadoj. Ili ŝajnas lastro kiu lantigas multe al ni malplaĉe tiun frenezan ritmon en kiu ni estas konvertante ekzistadon:

Vojaĝoj, festoj, trolaboro, malĉipaj aŭtomobiloj, belkonserva flegado, de desegnaj mebloj... Kaj ĉiam kun la preteksto de ke ni ĝin faras por ilia bono, por ke ili ĝuu tion kion ni nomas stato de bonfarto.

Ni ne trompu nin, ĉu ne estus pli bone dediĉi al ili iom pli da tempo kaj atento tial ke ili ne kresku belaj kvankam solaj, kultaj kvankam malvarmaj, dorlotitaj sed malhavantaj valorojn?

Geinfanoj ja similas bonsajo, altaprezaj kaj dezirataj specimenoj kiuj pluvivas minimume en siaj ornama fajenca pledo. Mi esperas ke, kreskinte ilia spirita kaj humana riĉeco ili atingu esti pli grandaj ol tiuj ridindaj pomoj.

Teresa Rodriguez

MESAĜOJ

La pasintan 20an de majo la prezidanto de Antaŭen, Cesáreo García, atingis laborpostenon en la avilesa Urbodomo kiel direktoro de nova kultura servo: la Fako LINGVA kaj pri Astura Tradicia Kulturo (asturlingve: Estaya Llingüística y de Cultura Tradicional Asturiana – ELliCTA). Ĝi taŭgos kiel servo por la normaligado de la astura lingvo en Avilés kaj por la stimulado de la astura popola kulturo. “Cezaro” diris al ni ke, se la politikistoj konsentas, li klopodos igi ĉi tiun oficejon spaco por interkomprenado de lingvo kaj kulturoj kaj, sendube, ankaŭ la internacia lingvo havos lokon. Gratulon kaj faru bonan laboron favore al la lingva kaj kultura riĉeco!

Antaŭ monato proksimume, nova amikino partoprenas en la posemajnaj kunvenoj de Antaŭen. Ŝi estas Diana Ĉoanda, rumana pentristino kiu nuntempe loĝas en Avilés kaj kiu tre interesiĝas pri Esperanto –fakte ŝi estas lernante rapide nian karan lingvon. Por ni estas tre riĉiga tio, ke homoj de aliaj landoj kontaktu vidalvide kun ni tial ke ni povu lerni pri siaj lingvo, kutimoj kaj kulturo (kaj iam bela pentrarto!). Ja Esperanto kunigas la popolojn! Ek, Diana, kaj daŭre lernadu tiel bone!

Barcelona Esperanto-Centro organizas kunveno
por BEC-membroj kaj gesamideanoj sub la nomo:
4-aj Someraj Dialogoj Esperanto-Restadejo 10-an kaj 11-an de septembro.
Cami del Pou, 9, 08691
Monistrol de Montserrat
Barcelono, Hispanio
Informoj: S. Aragaj,
Tel. 93 333 80 81 kaj 645 404 755



Rememoru ke vi povas
kontakti nin retroŝtante ĉi tien: esperanto@asturies.org

INTERRETO



RAKONTO EL BRAZILO

Junulino estis en aviadilejo de flughaveno atendante sian ekflugon. Pro tio, ke ŝi devos longe atendi, ŝi decidis aĉeti libron, por pasigi la tempon. Ŝi aĉetis ankaŭ biskvitopaketon. Poste ŝi sidiĝis sur brakseĝo ripozi kaj kviete legi.

Apud ŝi sidiĝis viro. Kiam ŝi elprenis unuan biskviton, la viro ankaŭ elprenis unu.

Ŝi sentis sin kolera, sed nenion diris. Ŝi nur pensis: Jen needukito.!

Se mi pli emus, mi pugnus lian okulon, por ke li neniam forgesu.

Ĉiu foje, kiam ŝi prenis biskviton, ankaŭ la viro prenis unu.

Tio kolerigis ŝin tiel, ke ŝi eĉ ne kapablis reagi.!

Kiam nur restis unu biskvito, ŝi ekpensis: Kion nun faros tiu kaŝitulo?

Tiam la viro dividis la lastan biskviton en la mezo, lasante duan parton por ŝi.

Tio estis troa ; ŝi estis spermezure kolera!

Tiam ŝi kunprenis sian libron kaj aĵojn kaj direktis al la aviadilo.

Kiam ŝi sidiĝis en aviadilo, ŝi rigardis en sia sako por elpreni sukeraĵeton kaj surprize

La biskvitosaketo tie estis, tuta kaj fermita. Nun ŝi ekkonsciis, ke ŝi eraris.

Ŝi forgesis, ke ŝi enmetis siajn biskvitojn en sian sakon. Ŝi eksentis honton!

La viro dividis siajn biskvitojn sen apero de kolero, nervozeco aŭ ribelo,

Kiam ŝi skuiĝis ekpensante, ke ŝi dividis siajn biskvitojn kun li.

Kaj ne estis plu da tempo por klarigi aŭ por peti pardonon.

Kiel ofte en nia vivo ni manĝas biskvitojn de aliuloj sen konscii tion?

Antaŭ ol konkludi, vi observu pli bone la aferojn, eble ili ne estas tiel samaj, kiel vi pensas.

Ne pensu tion, kion vi ne scias pri la homoj.

Estas kvar aferoj en la vivo, kiuj oni ne regajnas:

La ŝtonon post ol jeti ĝin

La parolon post ol prononci ĝin

La okazio post ol perdi ĝin

Kaj la tempon post kiam ĝin fluis...-

Kunlaborantino: **OLGA GLENDOVA**
ĈEĤIO

LA FILO DE LA LAVISTINO

Al la filo de la lavistino ĵetis ŝtonojn la infanoj de l'administranto, ĉar li iris ĉiam ŝargita per sitelo da tolaĵoj, post la dikulino, lia patrino, survoje al la lavejo. La infanoj de l'administranto fajfis kiam li pasis, kaj multe ridis pro liaj kruroj, aspekte similaj al la sekaj palisetoj, kiuj krake rompiĝas de varmo. Al la infano de la lavistino oni sentis la emon perŝtone rompi la senharan kapon, similan al melono, la longan kaj grizan kapon kun cikatroj, la stultan kapon, tiel incitan. Iutage, la infanon de la lavistino lavis en la pelvo sia patrino, kiu sapis al li la kapon, la akvomelonan kapon, ŝtonecan kapon, dikkapan kapegan kapon, nepre frakasindan. Kaj la dikulino donis al li kison sur la glata kapegaĉo, kaj jen, en la kisata loko, per nuraj ŝtonbatoj, elŝprucgis al li sangon la filoj de l'administranto, kiuj atendis lin kaŝe post la florintaj rubusoj.

El la libro **“La stultaj infanoj”**

Verkis: **Ana María Matute**

Esperantigis: **Liven Dek**

El la libro de Sava Pojvov "Ruza Petro"

DIVINO

La agroj apartenantaj al tri fratoj estis unu apud alia. Nur limsulko dividis ilin. Sur la



sulko, kiu ligis la tri agrojn, estis juglandarbo.

Aŭtune la tri fratoj iris kolekti la maturajn juglandojn. Ili kolektis nur unu sakon, sed ĉar ili kverelis konstante inter si kaj ne vivis en konkordo, ili ne povis dividi la juglandojn. Ili vokis Ruza Petron dividi la fruktojn egale.

Ĉiuj sidiĝis apud la plena sako. Ruza Petro prenis unu manplendon da juglandoj kaj metis ilin sur la teron antaŭ la unua frato. Li denove ĉerpis kaj metis du manplenojn antaŭ la duan.

-Kial tiel, onklo Petro? -la unua frato demandis mirigite.

Ne respondante Ruza Petro ĉerpis denove kaj metis antaŭ la trian fraton tri manplenojn da juglandoj:

-Ja kial al li tri? - la dua sin aŭdigis.

Petro metis la sakon sur sian dorson.

-Kaj la restaĵo? -la tria kriis,

-La restaĵo estas por mi! - Ruza Petro diris.

-Ĉu eblas tiel?

-Kia do estas tiu ĉi divido?!

-Ĉu oni ne devas dividi egale?!

Kaj la tri fratoj komencis indigni.

-Se vi bone scias, vi mem dividu ilin frate, egale, pace kaj kviete! -

Ruza Petro diris al ili kaj demetis surteren la sako kun la juglandoj.



Kunlaboranto: **VALENTÍN GEORGIEV**
BULGARIO

LA "SAĜA" MULO

Iam vivis mulo, kiu pensis pri si mem, ke ĝi estas la plej saĝa besto tra la mondo.

Iutage ĝi enpaŝis ĝardenon, kie ŝi ekvidis grandan pomarbon havante multajn ruĝajn fruktojn. Sub la arbo ĝi ankaŭ vidis longsarmentan kreskaĵon havantan grandan akvomelonon.

-Kiel stulte oni aranĝis ĉi tiun mondon! -diris ĝi mallaŭte-. Oni estus lasinta al mi la aranĝon, al la saĝa mulo, mi tuj alimaniere aranĝus ĉion."

Ekaŭdis la indignon de la mulo pasereto
la branĉo de

-Kial vi estas
mulo?- demandis
birdeto.

-Do, ĉu vi ne
la mulo-. Stulte estas,
pomarbo kreskas nur
infanpugno kaj la
kadukadas sub la
al la kapo de la bovo. Se
pomarbo kreskus akvomelono

pomo -diris la mulo frotante sin al la pomarbo por grati sin.

En tiu momento subite pomoj falis sur ĝian kapon.

-Ia! Ia! -ekkriegis dolore la mulo.

-Nu, vidu, saĝa mulo! Tamen estas bonaranĝita la mondo. Kio okazintus, se anstataŭ kelkaj pomoj akvomelonoj falus sur vian kapon?

-ekridis la pasereto.

La mulo diris nenion, nur honte foriris.

sidante sur
pomarbo.

malkontenta,
ĝin scivoleme la

vidas? -murmuris

ke sur la granda


etaj fruktoj simile al

malfortaj sarmentoj

akvomelonoj, similante

ĝi dependus de mi sur la

kaj sur la sarmento la



El la hungara gazeto "VESPERTO"

sendis: *KATYA VIRGINIA DE S. RAMOS DE BELEM*
BRAZILO

ROTTERDAMO

Rotterdamo estas tre moderna urbo. Kaj la germanaj kaj la aliancanoj tute detruis la malnovan urbon. Post la milito oni decidis ne rekonstrui la urbon, sed konstrui tute modernan urbon. Unue oni devas alkutimigi la aspekton, parte similas NY, sed finfine ni trovis multajn interesajn aspektojn, ekzemple domojn, kiuj staras sur la pinto de la tegmento, do la enirejo estas sajne en la alteco. Aŭ ronda altdomo kiel kraĵono, kies fenestroj sajnne estas inversaj. Tamen felice kelkaj malnovaj konstruaĵoj el la tempo antaŭ la milito ankoraŭ estas videblaj, ekzemple la urbdomo. Rotterdamo nun estas la plej granda haveno de Eŭropo. (Ni ankaŭ veturis tra Nieuwe Binnenweg, sed bedaŭrinde ne vidis nian stelon de UEA!)

Antwerpeno estas aminda urbo. Jam de fore la turo de la katedralo regas la urbbildon. Ni vere ĝuis longe esti en la katedralo kaj admiri la artaĵojn, speciale 3 grandegajn bildojn de Rubens. Sur la foirejo ni eĉ povis ĝui Cappucino antaŭ la monumento de la "Manjetanto", kiu donis la nomon al Ant(mano)werpen(jeti).

EDITH KAJ HORST

MAGDEBURG



Amuĵoj

سليمون



Angla edzo: — Ĉu mi dolorigis vin?
 Lia edzino: — Tute ne. Kial vi demandas?
 La edzo: — Tial ke vi iom moviĝetis.

Fremdulo diras al amiko:
 — Ha! la bervalaninoj estas vere
 inteligentaj.
 — Jes, certe. Kiel vi rimarkis tion?
 — Hieraŭ vespere mi renkontis belan
 junulinon. Bedaŭrinde ŝi ne parolis
 Esperanton. Mi desegnis glason sur peco
 da papero, kaj ŝi tuj komprenis, ke mi
 invitas ŝin al drinkejo.
 — Tio estas ja signo de ega inteligenteco.
 — Atendu. Post du minutoj ŝi prenis
 pecon da papero kaj desegnis lito.
 — Ho!
 — Jes. Kiel ŝi povis tiom rapide diveni, ke
 mi estas litfabrikanto?

Naiva junulino unuafoje vidas la
 membron de sia amiko. Kiam li
 proponas al ŝi la amorludon, ŝi
 timas, ke tio vundos ŝin.
 — Ĝi estas multe tro longa!
 Sed la naturo, kiel kutime, aranĝas
 la aferon, kaj al la ĵus malvirgigita
 knabino tiom plaĉas la ludo, ke ŝi
 krias al sia amiko:
 — Karulo, enŝovu ĝin pli
 profunden!
 — Mi ne povas pli.
 Ŝi dubas kaj palpe kontrolas, ĉu li
 diras la veron. Subite ŝi riproĉas:
 — Ho! estas stulte, ke vi faris
 nodon.

Viro diras al amiko:
 — Hieraŭ mi rakontis al via
 edzino tiom komikan ŝercon, ke
 pro ridego ŝi falis el la lito.

Knabineto eniras en sukeraĵejon.
 — Mi deziras ĉokoladan bebon,
 kiun vi havas en via
 montrofenestro.
 — Bone, etulino. Jen ĉokolada
 bebo.
 — Ne tiu. Ĝi estas knabino. Mi
 petas, donu al mi knabon.
 — Kial do?
 — En knabo estas iom pli por
 frandi.



En termofonta stacio junulo galante
 deklaras al juna, bela oficistino:
 — Pasintjare mi venis ĉi tien pro
 miaj kruroj. Nun mi revenis pro la
 viaj.

PETAĴO


Mi petas humoraĵojn el diversaj landoj por
 publikigi en ĉi tiu revueto. (mi antaŭdankas)
 Sendu al:

CÍSIMO R. SIMÓN
 C/ La Magdalena n° 26 - 1° D

Dum maturiĝo

Dume la suno brulas superkampojn
Jam maturiĝos spiko apud spiko
Portas mezsomero sia fruktaĵojn
Por korpa nutro al homoj, idoj

Perforto kia brulas inter homojn?
Ĉu maturiĝos jam cerbo apud cerbo?
Kiam kantos la kreskado sonojn
Por animnutro al la homa gento?



La profundo en profundeco

La profundo de la laget' situas profunde en la arbareg'
Sur la ties profundeco respegulas la ĉiela profundo
Pli profunde ol scio de la homsciencia profundo.

“ARBARA STELO”

Kunlaborantino: HELEN HAAPSAARI

Finlando